

Michael Schmidt-Salomon
Helge Nyncke

Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido

Libro por ĉiuj, kiuj ne
akceptas trompojn



Alibri

La eta porkido kaj la eta erinaco ĉiam kredis ke ili fartis kiel eble plej bone.

Sed iam ili ekvidis afiŝon sur kiu estis skribita: „Kiu Dion ne konas, al tiu io mankas!”

Do, ili ekmarŝis por serĉi Dion.

Nekredebla plezuro por ĉiuj etaj kaj grandaj homoj, kiuj ne akceptas trompojn.



ISBN 978-3-86569-141-5

Michael Schmidt-Salomon
Helge Nyncke

Kie ni povas trovi Dion? demandis la eta porkido

Libro por ĉiuj, kiuj ne akceptas trompojn



Teksto:
Michael Schmidt-Salomon
Ilustraĵoj:
Helge Nyncke

La eta porkido kaj la eta erinaco sidis en la bankuvo kaj ridis plenkore.
Tion ili faris ĉiam dum la suno brilis aŭ dum la pluvo teren falis.
„Ho, kiel ni bonfartas!”, diris la porkido.
„Ne eblus pli bone farti!”, pensis la erinaco kaj larĝetendis siajn brakojn.
„Mi povus ĉirkaŭbraki la tutan mondon!”
„Grandioza ideo”, respondis la eta porkido. „Sed antaŭe ni pluku kelkajn
pomojn. En mia ventro estas murmurado.”
„Bone”, diris la eta erinaco.





Elirinte la domon la paro tuj rimarkis ion strangan. Iu fiksis afiŝon al ilia eta porkido dumnokte. „Kiu Dion ne konas, al tiu io mankas!”, staris tie. La en lernejo,

„Porkido, ĉu vi konas Dion?”, demandis la erinaco. „Ne”, diris la porkido.

„Nek mi”, diris la erinaco.

Pri tio ambaŭ tre ektimis. Ili ja tute ne supozis ke io mankis al ili! Do, ili ekmarŝis por serĉi Dion.

**Kiu DION
ne konas,
al tiu io
mankas!**



„Kie ni povas trovi Dion?“, demandis la eta porkido al ĉiu besto kiam ili renkontis dum sia migrado. Sed neniu iam aŭdis ion pri Dio, nek la ansero nek la leporo nek la talpo. Nur la ruza vulpo sciis respondon. „Mi iam aŭdis kelkajn homojn kvereli pri Dio“, diris la vulpo. „Tie supre sur la templomonto ili konstruis grandajn domojn al li.“ „Pri kio ili kverelis?“, demandis la eta erinaco. „Mi kredas, ke ili ne konsentas pri la demando, en kiu domo ĝuste loĝas sinjoro Dio“, respondis la vulpo kaj mallaŭte aldonis: „Se vi demandas min, mi konsilas ne iri tien! La homoj tie supre estas iom frenezaj!“ La eta porkido kaj la eta erinaco ĝentile dankis la bonan konsilon de la vulpo. Sed ili estis tiom scivolaj, ke ili supreniris la monton malgraŭ la averto. Ne pre ili devis eltrovi kio mankas al ili!





Grimpinte ĝis la supro de la monto, ili ekvidis tri grandegajn domojn, kiuj staris tute proksime unu apud la alia. Kolosaĵon tian la du amikoj ankoraŭ neniam vidis.

„Tiu sinjoro Dio ja devas esti terure granda, se li bezonas tiel grandajn domojn”, diris la eta erinaco. Kaj li ankaŭ ektimis: „Porkido, ĉu vi ne pensas, ke ni tamen prefere iru hejmen?” „Stultaĵo, erinaco!”, diris la porkido. „Nun, ĉar ni jam tiom longe migris, ni ankaŭ konatiĝu kun la sinjoro!”

Tio sonis tre kuraĝe, tamen sekrete la eta porkido ankaŭ sentis iom da timo, sed ĝi ne volis montri tion al la eta erinaco.

Erinaco kaj porkido iris al la unua domo. Antaŭ ĝi staris viro kun amuza ĉapelo kaj longaj nigraj bukloj. „Kie ni povas trovi Dion?“, demandis la eta porkido. „Tiu-ĉi estas la templo de la Sinjoro, estas sinagogo“, klarigis la viro. Kaj li sciis pri kio li parolis, ĉar li estis „rabeno“, juda klerulo. „Ho, bone!“, diris la eta erinaco. „Ĉu la sinjoro estas hejme? Ĉu ni rajtas mallonge paroli kun li? Ne daŭrus longe ...“ „Nur se via patrino estas judino!“, respondis la rabeno. „Judino?“, demandis la erinaco. „Mia panjo estas erinacino!“ „Kaj la mia porkino“, aldonis la eta porkido. „Mi bedaŭras!“, diris la rabeno. „Nur ni judoj rajtas eniri la templon je tiu solenaĵhoru! Kaj etaj porkidoj neniukaze rajtas eniri ĉi-lokon!“ „Sed tion mi tute ne trovas afabla!“, diris la porkido. „Ankaŭ Dio la ĉiopotenco ne estas afabla!“, klarigis la rabeno. „Li estas ĉionscia kaj ĉielbona, sed li ankaŭ povas sufiĉe koleriĝi, se oni ne sekvas liajn ordonojn!“ Kaj por pruvi tion li rakontis la historion de la granda inundo.





„Ĵutage”, diris la rabeno, „Dio, la Sinjoro, tiom ĉagreniĝis pri la homoj, ke li decidis detrui ĉian vivon surtere.”

„Ĉian vivon?”, demandis la porkido ektimigite. „Ĉiujn homidojn, ĉiujn avinjojn kaj ĉiujn bestojn? Ĉu ankaŭ la porkidojn, la erinacojn, la papiliojn kaj la etajn kobajojn?” „Jes, ĉian vivon”, respondis la rabeno. „Krom unu paro de ĉiu specio. Tiujn arigis Noaĥ, favorato de Dio, sur sia ŝipo, la arĥeo Noaĥ. Tiam Dio igis la ĉielon pluvi tiom longe ĝis ĉiuj aliaj homoj kaj bestoj dronis.”

Ioman tempon erinaco kaj porkido silentis embarasite. Tiom da dronintaj beboj, avinjoj, porkidoj, erinacoj kaj kobajoj ili tute ne povis imagi. „Tio ja estas vere fia!”, pensis la eta porkido kaj planis tre forte surtreti la piedojn de tiu sinjoro Dio, se ĝi iam lin renkontus.





„Kian fiaĵon la homoj do faris ke ili ĉiuj devis droniĝi?“, volis scii la eta erinaco. „Ili adoris aliajn diojn!“, respondis la rabeno. „Aĥ, ĉu ekzistas ankoraŭ aliaj Dioj?“, demandis la erinaco surprizite. „Ne!“, diris la rabeno. „La homoj nur imagis tion. En realo tiuj dioj same neekzistas kiel blu-verdstriaĵ fantomoj ...“

„Ho, bone“, diris la eta porkido. Ĝi pripensis momenton. „Se la homoj povas iluzii al si diojn“, ĝi diris malrapide, „kiel ni sciu certe ke vi ne ankaŭ iluzias al vi vian Dion?“

Tio estis vere bona demando, eta porkido! Sed bedaŭrinde ĝi tute ne plaĉis al la rabeno. Li terure koleriĝis kaj tiom laŭte sakris ke erinaco kaj porkido rapidis for.

„Mi vetas, ke li elpensis tiun rakonton nur por timigi nin!“, anhelis la porkido dum ili forkuris. „Sed kiu fakte estas tiom stulta, ke li kredas tian historion?“ „Mi certe ne kredas je Dio, kiu dronigas etajn kobajojn nur ĉar kelkaj homoj vidas fantomojn!“, diris la eta erinaco.





Kaj tiel erinaco kaj porkido kuris al la dua domo. „Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj!”, diris la viro, kiu staris antaŭ la domo. Li havis amuzan, violkoloran ĉapelon surkape kaj portis strangan vestaĵon, kiu preskaŭ tuŝis la plankon.

„Kie ni povas trovi Dion?”, demandis la eta porkido al la viro. Montriĝis ke li estis vera episkopo kaj tial li certe devis kompetenti pri tiaj demandoj.

„Ĉi tio estas la domo de Dio, ĝi estas preĝejo!”, klarigis la episkopo. „Se ni kunvenas en la nomo de la Sinjoro, li estas inter ni!”

„Bone!”, diris la eta erinaco. Ili do enpaŝis la preĝejon.



Ene estis tre malhele kaj ankaŭ odoris iel strange. „Kie li do estas, la sinjoro Dio?“, demandis la eta porkido. La episkopo montris antaŭen. Erinaco kaj porkido ektimigite fiksrigardis la duonnudan viron, kies manoj kaj piedoj estis per pintaj najloj fiksitaj al kruco. Sur lia kapo li portis kronon el dornoj kaj lian korpon ĉie makulis sango.

„Oj!“, diris la eta erinaco. „Ĉu tio ne terure doloras?“ „Do, la Sinjoro sendis al ni lian filon, Jesuon Kriston, kiu pro niaj pekoj mortis sur la kruco!“, klarigis la episkopo. „Ho, tion la sinjoro vere ne devintus fari“, diris la eta porkido. „La eta erinaco kaj mi ja ĉiam estas tute bonkonduktaj ...“ „Per la sango de Jesuo la Sinjoro purigis nin de la peko!“, diris la episkopo. „Per sango? Kiom naŭze!“, diris la eta porkido. „Kaj mi ĉiam pensis ke oni sin lavu per sapo!“, miris la eta erinaco.





„Dio donis al ni ĝojigan mesaĝon. Se ni sekvas lin, nin atendas la ĉiela regno!”, diris la episkopo.

„Nu, tamen la homoj ĉi tie ne aspektas vere ĝoje”, pensis la eta porkido. „Ili rigardas al la mondo kiel funebrantoj!” Ne, ĉi tie la porkido certe ne volis resti pli longe. Sed tiam ĝi malkovris ion, kiu vere plaĉis al ĝi: Amason da keksoj! Ili kuŝis sur granda ora telero sur la tablo. Kaj ĉar la eta porkido ankoraŭ malsatis, ĝi tuj enbuŝigis kelkajn el ili.

Sed tio tute ne plaĉis al la episkopo! „Je la volo de Dio, kion vi faras tie?”, li kriis kolere. „Mi manĝas keksojn, ĉar mia ventro murmuras”, diris la porkido. „Sed tiuj ne estas keksoj, tio estas la korpo de la Sinjoro!”, riproĉis la episkopo. Perfingre li montris al la viro sur la kruco: „Tio estas la karno de Jesuo, kiu sin oferis por ni!”

Oj, tiam la eta porkido eksentis veran vomemon. Ĝi ja ŝatis manĝi pomojn kaj karotojn kaj ankaŭ fungojn, sed ne viron, kiu mortis antaŭ multaj jaroj! Rapide la porkido elkraĉis la strangajn kuketojn kaj prenis la manon de la erinaco. „Ek, for de ĉi tie!”, ĝi kriis. „Ili estas hommanĝantoj! Se ili jam manĝas la filon de la sinjoro Dio, kiamaniere ili fitraktos etajn erinacojn kaj porkidojn ...”





„Por konatiĝi kun Dio, do kun Alaho, vi devas iĝi islamanoj!”, klarigis la muftio. „Kaj kiamaniere oni iĝas islamano?”, demandis scivole la eta porkido. „Nu, unue vi devas parkere deklami la islaman doktrinon”, klarigis la muftio. „Kaj vi devas fidele sekvi la ordonojn de Alaho. Pleje gravas ke vi preĝu kvinfoje tage!”

„Ĉu vere kvinfoje?”, demandis la eta porkido. „Jes”, respondis la muftio. „Kaj vi ĉiam devas zorge lavi vin antaŭ tio!”

„Laviĝi kvinfoje tage?” La eta erinaco rulis la okulojn. „Tio signifas ja tridek kvin fojojn semajne kaj cent kvindek fojojn monate!” Volonte la eta erinaco ankoraŭ estus elkalkulinta, kiom ofte tio estus jare, sed finfine tio estis tro malfacila por ĝi.

„Nekredeble, ĉu la sinjoro Dio havas purecmanion?”, sin demandis la eta porkido. Unufoje semajne eniri la bankuvon kun la erinaco, tio ja estis bela kaj bona, sed ne vere tridek kvin foje.


„Mi certe ne preĝos kvin foje tage!“, diris la eta erinaco. „Mi havas aliajn farenaĵojn!“ „Tiukaze vi ne povas iĝi islamano“, klarigis la muftio. „Nu, tiukaze mi simple rezignas pri tio!“, la erinaco levis siajn ŝultrojn. „Tio ne povas esti tiom grava ...“

„Ne tiom grava!“ La okuloj de la muftio fie brilis. „Se vi ne obeas al la Sinjoro, vi estos sendita al la infero kaj eterne rostiĝos en la fajro!“ „Nur ĉar ni ne sufiĉe ofte nin lavis?“, demandis surprizite la eta porkido. „Ĉar vi malatentis la ordonojn, kiujn Alaho donis al la profeto Muhamado!“, diris la muftio.

„Sed kiel ni sciu ke via Muhamado ne simple nur elpensis tion?“, demandis la porkido. „Eble li tute ne estis profeto sed simple primokis vin?“

Ho! Tion la eta porkido prefere ne estu dirinta! Ĉar nun la sentoj de la muftio estis vunditaj. „Vi didamnitaj nekredantoj!“, li kriis kaj furioze kuris en la direkton de porkido kaj erinaco.

Kiel eble plej rapide la du kuris al la elirejo de la moskeo.





Sed, ve, ve: Ekstere jam atendis la rabeno kaj la episkopo. „Kaptu ilin”, kriegis la rabeno. „Ili blasfemis!” „Kaj ili senhonorigis la korpon de la Sinjoro!”, kriis la episkopo. „Kaj ili ankaŭ insultis la profeton!”, kriis la muftio, kiu tiumomente rapidkuris el la moskeo. Erinaco kaj porkido estis rigidaj pro timo. „Oj, oj, mi kredas ke nun ni estas en vera danĝero!”, balbutis la eta porkido. „Ili estas obseditaj de la diablo, sed mi rapide elpelos lin”, kriis la episkopo. „Neniel! Ni jam elpelis demonojn, kiam vi ankoraŭ tute ne ekzistis!”, respondis la rabeno. „Sed la profeto estis la unua, kiu montris, kiel ĝustamaniere trakti nekredantojn!”, respondis la muftio. „Krom tio nia infero estas multe pli varmego ol la via!” „Impertinentaĵo”, riproĉis la episkopo kaj batis la muftion per la biblio sur la kapon. „Nia infero estas la pleje plej terura!” Kaj tuj la tri servistoj de Dio interbatiĝis. Kaj dum ili tiom sovaĝe batalis, ili tute ne rimarkis, ke erinaco kaj porkido kaŝe foriris.



Denove hejme, la eta erinaco diris: „Porkido, nun mi scias kio al ni mankis la tutan tempon ...” „Kio do?”, demandis la eta porkido. „Sen Dio ni ne timis ion ajn!”, diris la erinaco. „Prave!”, opiniis la porkido. „Sed ĉu la timo mankis al vi?” „Ne!” respondis la eta erinaco. „Vere, mi tre volonte rezignas pri la sinjoro Dio kun liaj strangaj servistoj!”

Erinaco kaj porkido ankoraŭfoje rigardis al la mistera afiŝo. „Mi pensas ke tie simple nur troas unu vorto!”, diris la eta porkido kaj per dika kraĵono forstrekis la vorteton „ne” de la afiŝo. „Verdire devus esti: ,Kiu DION konas, al tiu io mankas!’ precize ĉi tie supre ...” La porkido ridante montris al sia frunto. La eta erinaco kapjesis: „La homoj de la templomonto estas vere frenezaj! Mi ja kredas ke tute ne ekzistas tiu sinjoro Dio! Kaj se tamen jes, tiam li certe ne loĝas en tiuj fantomaj kasteloj!”



Kiu DION
~~ne~~ konas,
al tiu io
mankas! ☀

„Kiam vi pravas, erinaco, vi pravas!”, diris la eta porkido. „Sed kion ni nun faru pri la afiŝo? Ĉu ni ĝin lasu pendi tie?” „Ne!”, respondis la eta erinaco. „Mi havas multe pli bonan ideon!” Ĝi ŝiris la afiŝon de la muro kaj faris el ĝi multajn malgrandajn paperajn aviadilojn. Tiujn flugigis la eta erinaco kaj la eta porkido tute alten en la ĉielon. Hej, tio estis grandega plezuro! Finfine ambaŭ povis denove ridi plenkore. Same kiel ili ĉiam faris, ĉu la suno brilis aŭ pluvo teren falis ...

Kaj moralon de l' rakont' mi nun al vi proponas:
Se vi ne konas dion, ho, lin vi ne bezonas!





PS

Gekaraj legantoj ne havu la penson:
„Nekono de Dio limigas la menson.”

Atentu, ĉar sekreton nun malkaŝi ni deziras
(kaj tamen plaĉus tre al ni, se ĝin vi pluen diras):

Multloka kredo pri la Dio
verdire (r)estas iluzio
Kiel ni, la rabenoj, pastraĉoj, muftioj
tutsimple nur estas nudaj simioj
sed ili vigle fantomumas
kaj kurioze sin kostumas

fiaskis tromp' de la porkido:
triumfas ĝi per granda rido...

La aŭtoroj:

Michael Schmidt-Salomon, Dr. phil., naskiĝis en la jaro 1967, estas libera aŭtoro, filozofo kaj muzikisto. Li interalie aktivas kiel la estrara parolanto de la fondaĵo „Giordano Bruno“. En la eldonejo Alibri jam aperis de li jenaj libroj:

Erkenntnis aus Engagement (1999); Stollbergs Inferno (filosofa romano, 2003), Manifest des evolutionären Humanismus (2005); „Aufklärung ist Ärgeris ...“ Karlheinz Deschner: Leben – Werk – Wirkung (eldoninto kun Hermann Gieselbusch, 2006); Die Kirche im Kopf. Von „Ach Herrje!“ bis „Zum Teufel!“ (kun Carsten Frerk, 2007).

Michael Schmidt-Salomon vivas kune kun lia „postfamilia familio“ (du biologiaj kaj tri kunvivantaj infanoj kaj tri aliaj plenkreskuloj) en la orienta Eifel-regiono (Germanio). Pliaj informoj: www.schmidt-salomon.de/

Helge Nyncke, naskiĝis en la jaro 1956, estas diplomita stilisto, ilustristo kaj aŭtoro. Li ilustris, skribis kaj ekkreis multnombrajn lerne-, inform- kaj bildlibrojn, ludilojn kaj trukfilmojn por infanoj. Li ankaŭ verkis kritikajn esejojn, scenarojn, kabaredistajn kaj liberajn tekstojn por plenkreskuloj. Krome li trovis tempon, krei artaĵojn aŭ plibeligi infanmalsanulejojn. Tiu kvarobla patro kaj multobla idekreinto loĝas kaj laboras en Mühlheim ĉe Main (Germanio).

La originala libro estis finance subtenata pere de la fondaĵo „Giordano Bruno“ (www.giordano-bruno-stiftung.de).

La originala verko aperis en la jaro 2007 sub la titolo *Wo bitte geht's zu Gott? fragte das kleine Ferkel. Ein Buch für alle, die sich nichts vormachen lassen* en Alibri Verlag, Aschaffenburg (Germanio). Tiu infanlibro komence riskis troviĝi sur listo de libroj malpermesitaj por junuloj (indekso) pro sia religikritika enhavo. La germana federacia ministerio por familio, maljunuloj, virinoj kaj junularo iniciatis malpermesproceduron. Post nelonga sed tre intensa publika diskutado la kontrolkomisio por junulardanĝeraj verkoj finfine rifuzis tiun malpermeson.

La eldonejo Alibri (www.alibri.de) estas membro de la Assoziation Linker Verlage/aLiVe (Asocio de Maldekstraj Eldonejoj).

Elgermanigis: Libera Pensantino

Reviziis: Poefago, Roland Schnell, Renato Corsetti kaj multaj aliaj

1a eldono esperantlingva 2011 (surbaze de 1a eldono germanlingva 2007)

© 2011 Alibri Verlag, Postfach 100 361, 63703 Aschaffenburg, Germanio

Ĉiuj rajtoj, ankaŭ de eltiraj kopioj, de fotomekanika kopiado, de produktado de mikrofilmoj, de elektronika memorigo kaj de tradukadoj rizervitaj.

Kuverta: Helge Nyncke

Tipografio: ImPrint Verlagsservice, Jörn Essig-Gutschmidt, Münster

Presado kaj prilaboro: Interpress, Budapest

ISBN 978-3-86569-141-5